

bretonia esperanto-federacio jarraporto 2004

Nombro da membroj 2004 : 349 (+ 35).

Nombro da partoprenantoj en Esperantaj kursoj : 195 (+ 35).

Nombro da lokaj grupoj : 18, en la urboj :

— Côtes-d'Armor : Saint-Brieuc, Plouézec, Saint-Quay-Perros, Lannion, Plestin-les-Grèves, Yffiniac, Guingamp ;

— Finistère : Quimper, Daoulas, Morlaix ;

— Ille-et-Vilaines : Rennes, Saint-Malo, Chartres-de-Bretagne, Iffendic ;

— Morbihan : Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy.

Konstantaj agoj de la Federacio :

Eldono de la bulteno *La Verda Triskelo* (3 jare).

Organizado de rondvojaĝoj de esperantistaj eksterlandanoj en bretonaj urboj. Notinde la vojaĝo (post la staĝo de Plouézec) de 6 ĉinoj fine de aŭgusto tra la esperantistaj asocioj de la departemento Ille-et-Vilaine, kun oficiala akcepto de la vicurbestro de Rennes, subvencioj de la urbo Rennes kaj de la ĝenerala konsilario de Ille-et-Vilaine.

Koruso Esperanto-Bretagne MEVEN : ĉiumonate kantoprovoj en Pontivy. Eldono de dua kompaktdisko, pri maristaj kantoj. Preparado de spektaklo okaze de la venonta kongreso de Boulogne.

Organizado de la ĝenerala asembleo.

Pruntodono de ekspozicioj.

Specifaj agoj de la Federacio :

Junio : forumo pri lingvoj en Brest : vasta budo tre vizitita.

Eldono de libro de Émile Masson, *La Rubekolo* (subvencio de la ĝenerala konsilario de Côtes-d'Armor).

Rilatoj kun la saksaj esperantistoj (regiono de Dresde, ĝemelita kun Bretonio) : interŝanĝo de bultenoj, renkonto de la du prezidantoj.

Agoj de la lokaj asocioj :

Ĉiun semajnon okazas kursoj en 18 bretonaj urbetoj, kaj konversaciaj rondoj en diversaj lokoj, kiel kafejoj en Daoulas, Vannes kaj Saint-Brieuc.

Internacia staĝo en Plouézec, organizita de *Espéranto 22* : de la 14^a al 21^a de aŭgusto partoprenis 180 personoj (el la eksterlandanoj estis 6 ĉinoj kaj 4 bulgaroj), kun diversaj kursoj kaj aktivadoj en la lingvo Esperanto : pedagogio, bretona lingvo (unufoje kaj tre sukcese), joko, teatro, informadiko (2 niveloj), kanto en koruso, turismo, bretonaj dancoj, diversaj prelegoj. Grandega sukceso, kun multaj artikoloj en la ĵurnaloj *Ouest France* kaj *Le Télégramme*.

Ekspresaj kursoj en 6 semajnoj (Saint-Brieuc).

Kursoj en liceoj en Saint-Brieuc, en mezlernejo en Lannion. Notinde : *Espéranto 22* ricevis oficialan aprobon de la akademio de Rennes por interveni en la lerneja sistemo.

Monataj elsendoj en Radio Clarté en Saint-Brieuc, kaj eĉ monata dulingva felietono kun du aktoroj !

Prelegoj de J.-P. Ducloyer pri Esperanto en pluraj libertempaj universitatoj (UTL), de Zef Jegard pri sia vojaĝo per biciklo tra Azio dank' al Esperanto, partopreno en forumoj pri asocioj kaj en publikaj festoj, kiel en Vannes « Festo sen limo ».

Rilatoj kun ĝemelitaj urboj (ekzemple Hennebont kun ĝia ĝemelita germana urbo).

Kunlaboro kun solidarecaj asocioj (Morlaix, Quimper).

Helpo de liceanoj por « travaux pratiques d'encadrement » pri Esperanto en pluraj liceoj (Saint-Brieuc), Montfort-sur-Meu...).

Helpo de studentoj pri magistrecado (temo rilata al Esperanto).

Espéranto 22 estas serĉanta rimedon por plilongdaŭrigi (pérenniser) kaj financi sian « emploi-jeune », kun profesiulo, kiu proponas plurajn solvojn.

Raportis : Josette Ducloyer